GISTO-MAJO-2006
G.O.Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

VERDA TAGMANGXO

Unuafoje mi vizitis la bufedon kie la gesamideanoj kune tagmangxas, apud GEA, centre de Porto Alegre, en chiu monato, la duan merkredon. Plachis al mi la ejo kaj la bufedaj opcioj krom glaseto da rugxa vino, por teni miajn enkorpajn kanaletojn plene malfermaj. La prezo rivalas kun tiu de aliaj samrangaj. Mi invitas, chiu vera esperantisto devas dum la monato navigi, por esti disponebla alprui gxustatempe ties adreson: Str.Gal. Kâmara nr°.318 – Laù mi, rimarkeblis intereso pri nia grupeto, far cheestantaj klientoj. Estus bonvene ke la grupo respekteble sed sufiche laùte interbabilus, laùeble kun sxercoj, por ke homoj che najbaraj tabloj rikoltu iomete el nia konversacio, havigante al ili oportunon pridemandi homon el nia grupo, “kiun strangan miksajxon ni uzas por komunikado”. Ne forgesu la rekomendon de nia gaùcha mecenata mosxto, Ivo Dr. Sanguinetti: **ONI DEVAS BRUI!**

INTERVJUO kun KORSETTI.

Ja vere, intervjuoj (enGH) bele taùgas por elmontri faceton de la intervjuato, chikaze de nia UEA-prezidanto Renato CORSETTI. Gxi plachis al mi, chefe tial, ke li menciis afrikan kantistinon, Miriam Makeba. Eble en la jaroj kvindekaj de la pasinta jarcento sxi rikoltis multajn aplaùdojn traBrazilo kaj la mondo pro sxia elsxtare bela vocho.

GAJA HAVENO

Ho, kara Cezar...vi surprizas viajn legantojn per via anonco, ke vi interrompos la eldonadon de via tre interesa E-informilo. Oni povas diveni, ke ankaù vi kvazaù seniluziigxis pro manko de reagoj al via utila laboro kiu havas la celon liveri instruan legadon. Nu, mi esperas ke via pravigo ne kasxas alian gravan motivon. Do...do, restos al Gisto la devo sursxultrigi sola parton de la informado.

.

GRAVA AVERTO.

Chefe por gesamideanoj kiuj ne kutimas legi mesagxojn venintajn per Internet, FAR SEKURECA POLICO:

.....Se vi iam trovos, che la enirejo de via logxejo, glumarkon (aù desegnite) unu el chi-subaj simboloj, tuj forprenu/elvisxu gxin. Ili estas kodigitaj signoj de informo inter grupoj kiuj atakas por rabi.

1 – Dika sago indikante supren – signifas: facile atakebla matene;

2 – Dika sago indikante dekstren – signifas:facile atakebla post-tagmeze;

3 – Dika sago turnita infren – signifas: facile atakebla vespere;

4 – Cirklo horizontale trastrekita (diametro) – signifas: domo vakas (senhomas) sed estas malfaciajxo;

5 – Cifero sep – signifas: domo senhoma en Julio;

6 – Cifero ok – signifas: - Domo senhoma en Aùgusto;

7 – Du duoncirkloj kun la aperturo supren turnitaj, sur horizontala streko – signifas: infanoj nur posttagmeze;

8 – Du duoncirkloj kun aperturo turnitaj infren, sur horizontala streko – signifas: infanoj nur matene.

9– Horizontala oblonga kvarlatero kun dekstren turnita horizontala litero-T (kusxanta-T) – signifas: tuttage hejmas sola oldulo.

Petatas helpi vaste diskonigi chi averton.

DANKA MENCIO

Longjara instruisto en Kaiurbo, ankaù de miaj tri knaboj, verkis libron pri sia 18-jara VIVO EN LA MEZEPOKO, dum li studis cele al pastrigxo, en pluraj gaùchaj municipoj. Li memoris kaj donacis al mi ekzempleron de sia verko. Tutkore mi dankas al li. Gxia enhavo, ne kiel intervjuo aù chiutagajxo, estas leginda, lerte verkita kaj nacilingve havas la titolon EU VIVI A IDADE MÉDIA. Oni devas doni al li rabaton, pro la moderna transitivigo de la verbo VIVI.

IFEFa 58ª Kongreso.

Jxus okazis en Sxangaj' (Chinio) la 58ª kongreso de Internacia Esperantista Federacio de Fervojistoj. Kunsidis homoj el 50 landoj. Krom la modela parolado de UEA-prezidanto R.Rossetti, aliaj bonaj oratoroj aùdigis sin, nuntempe per tre klara kaj forta modulado de CHO-RO-I nun aùdebla laù la frekvencoj 9860, 7310 kaj 6400 Khc. En la nuna sezono 10700 Khc gxi estas ne aùdebla. Najbarlandanoj povas aùdi CHO-RO_I, hispanligve, laù 7250 kaj 7334 Khc,pli forte kaj tre klare., sen fremda akcento en la prononco de la vortoj. Bele. – Kiu ankoraù ne flue kapablas paroli en Esperanto nepre devas chiutage aùskulti la modelan Esperanto de la chinaj geparolistoj sed...sed...oni ankoraù devas doni etan rabaton al la inoj. Povraj...la literoj R kaj L torturas versxajne chiujn azianojn, ne nur parole. Ankaù skribe fojfoje ili trompigxas, haj...haj...haj ! – Gaùcharo, aktive aùskultu, chefe nun kiam denove anoncatas konkurso de scioj pri Chinio. Ili premias diligentajn aùskultantojn. Mi mem uzas etetan donacitan radion, digitalan, precizan kaj tre kapablan kapti staciojn malfortajn. Bonvenus ke plurloke homoj kontrolus la fortecon de gxia signalo kaj oportune (unufoje en monato) ensendus raporton al ties estraro. La radiosignalo varias laù la sezonoj kaj atmosferaj kondichoj.

NIGRA MAGIO

(Prunte de Ergoto de Bonaero)

Vivis viro kiun mi malamis sed mi ne povis mortigi lin per miaj manoj, char li altis je unu metro kaj naùdek centimetroj kaj pezis centkvardek Kg. Mi decidis peti helpon che sorchisto. – Mi volas ke vi sorche "sendu tiun ulon en alian mondon!"- Mi diris.

- Nu bone – respondis la sorchisto. Li prenis pecon da vakso kaj tajlis figuron.
- Jen – li diris - montrante al mi vaksan pupon – via malamiko. - Chinokte, je la horo de la fantomoj, noktomeze, mi enigos dornon en gxian koron, kaj li mortos. - Vi sxuldas al mi du mil stelojn.
- Kiom da? – Du mil.
- Chu vi frenezas?! - Mi pagos al vi ducent.
- Mi ne donas rabaton. Por enmeti dornon en la koron, mi pagigas du mil stelojn.

Vidu, mi proponis, mi donos ducent stelojn kaj vi enigu la dornon kien ajn al vi plachos. Chu konsentite?

- Akceptite, flustris la sorchisto. Noktomeze la afero estos plenumata.

Mi volis gxui la spektaklon de la morto de mia malamiko. Tiunokte mi iris kafejen, kien li kutimis veni. Mi sidigxis che tablo proksima de tiu alia. Mi observadis atendante kun plezuro la epilogon. Noktomeze mia malamiko subite starigxis. Mi aùdis ke, dum gratado li grumblis: "Malbenita estu la maliculo kiu lasis premnajleton sur la segxo!"

VERDAJ STRUTOJ.

Tiaj estas homoj kiuj sin konsideras esperantistoj sed ne kuragxas verki duonpagxan tekston kaj submeti gxin al serioza kontrolo far veterano. Gekaruloj, neniam fieru, daùre eluzu sxancojn lerni plu!